

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO
DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO
ESPERANTISTA

IX. JARKOLEKTO

1926



RESPONDA REDAKTORO: RUD. HROMADA
REDAKTOROJ: H. K. BOUŠKA (PRAHA), O. GINZ (PRAHA),
Dr. STAN. KAMARYT (BRATISLAVA)
REDAKCIO & ADMINISTRACIO:
PRAHA VII.
SOCHAŘSKÁ 333

PRESIS JAN MINÁŘ NYMBURK

Sekve de la presista eraro la paĝoj 41-48 troviĝas dufoje : en la numero 4. (ĝuste) kaj en la numero 5-6. (ripete, false). La lasta paĝo de la n-ro 8. devas do havi ciferon 88 (anstataŭ 80), kaj la kaiero 9. komencas sekve de tio per ĝusta cifero 89. Ni petas pardonon de niaj abonantoj. Se vi bindigas la tutan jarkolekton, ne forgesu atentigi la bindiston pri la duoblaj paĝoj.

T A B E L O D E E N H A V O

LITERATURO

Signo * montras poemon.

Březina Otakar: La homaj aroj (Zástupové), Trad. Rud. Fridrich (Brno)	2
Čapek Karel: Edinburgh (El Anglaj leteroj), Trad. H. Taussig (Praha)	(Nro 4) 42
Medek Rud.: Pilgrimado de infanoj en Siberion, Trad. S. Dlouhá (Praha)	90, 102
Neruda Jan: *Biografioj de sanktuloj, Trad. Mil. Lukáš (Hradec Kr.)	19
Písecký Ferd.: Kreo de la homo, Trad. Jan Nosek (Skřivany)	30
Rutte Mir.: Scienca utopio en la moderna ĉeĥa romano, Trad. Rud. Hromada	31

El <i>angla</i> : E. Kellog: Regulus al la Kartaganoj, Trad. H. M. Scott (Boston)	18
Mulford Pr.: Rilato kun homoj, Tr. E. B.	(N-ro 5-6) 44
El <i>estona</i> : Suits Gustav: *Elegio de l' rozoj, Tr. H. Dresen (Tallin)	71
El <i>flandra</i> : Timmermans F.: La monahineto Beatrico, Trad. Jaes-Janssens (Antwerpen)	70
El <i>persa</i> : El Golestan, trad. E. Rebrik (Teheran)	2
El <i>rusa</i> : Merejkovskij: *Panteono, Trad. V. Vozdvijenskij (Odessa)	30
Šepkin-Kupernik: Feliĉo, Trad. la sama	4
Orlov K.: Leciono, Trad. I. Melnikov	78

Paneŭropo kaj esperanto, De D-ro Ĉ. Parma (Praha)	78
Festo de Sokoloj, Laŭ H. J. esperante de O. G.	(Nro 5-6) 42
Ekridetu; Trad. E. Rondeto Ĉerv. Kostelec	71
Co přeložiti z české literatury do esperanta (—ou—)	52
<i>Informoj pri libroj</i>	26, 27, 37, 43, 53, 78, 79, 98, 106
<i>Por komencantoj</i>	71, 104

EL SCIENCO

D-ro S. Kamaryt: El scienco	4
Progresoj ĉe uzo de karbo	4
Koloriloj	19
Grava ĉs. verko pri naturscienca terminaro	20
Prof. Jan Kranich: Progresoj de la kemio, Trad. D-ro Ĉ. Parma	65
Dr. Ĉ. Parma: Fido al la scienco	92

EL ĈEĤOSLOVAKIO:

<i>Informoj</i> , (Otto Ginz)	20, (n-ro 4) 44, (n-ro 5-6) 43, 60, 72, 92
„ (Rud. Hromada)	5, 32

ESPERANTISTA MOVADO

Tutmonda:

Al Naciaj Societoj (H)	6
Alvoko por XII. Floraj ludoj (Oficiala komunikilo)	11
La 24. internacia kongreso de la Paco (R. Fridrich)	11
18. internacia kongreso en Edinburgh	11, 24, 43 en n-ro 4., 72
Terura cirkulero (H)	11
Ni eliru el izoleco (Rud. Hromada)	17
Paska kunveno en Locarno (Rud. Hromada)	25
Locarno (Rud. Hromada)	(Nro 4) 41
Zamenhofa monumento (R. H.)	25
Pri Lingva komitato kaj Akademio (R. H.)	72
Alvoko de D-ro Dietterle pri jubilea statistiko	73

Pri la historio de esperanto de O. D. Ribaulb	52, 66
Z esperantskeho svĉta (O. Ginz)	14, 25, 40, 47 (n-ro 4), 56, 63, 80, 96, 108
Pri la gazetoj esp.	12, 43 (n-ro 4), 77, 97
Internacia konferenco en Praha, 1927 (Edm. Privat)	101

Ĉeĥoslovaka

Pri Ĉ. A. E.: Alvoko al aliĝo	7
Ĉs. Asocio Esperantista en 1925	21, 33
VII. jarkunveno de ĈAE en 1926	33
Firancoj de ĈAE en 1925	(n-ro 4) 46
Komitatoj de ĈAE en 1926	(n-ro 4) 46
Scienca Sekcio de ĈAE (Dr. Kamaryt)	(n-ro 4) 46
Ĉu vi estas jam membro de ĈAE	(n-ro 5-6) 45, 93
O nās a pro nās (Esperantistka)	38
Ĉas pŕitomnŕy, miulŕy a budouci (Esperantistka)	61
El ĈAE	61, 75
III. Ĉeĥoslovaka kongreso en Bratislava	8, 21, 45 (n-ro 4, 45 (n-ro 5-6), 46 (n-ro 5 6), 93
Ĉesu esti izolulo (R. H.)	89
Kroniko pri ĉeĥoslovaka movado	9, 24, 38, 47 (n-ro 4), 50, 62, 76, 95
Alvoko de ĉs. profesoroj	6
Niaj mortintoj	10, 51
Laborista Ligo Esperantista	13
Esperanto kaj inteligentaro (Dr. Ĉ. Parma)	94
Uĉitel esperanta. (Jul Šupichovŕ)	105

LINGVA FAKO

14.—19. text k pŕekladu a vzornŕy pŕeklad	26, 44 (n-ro 4), 53, 66, 79, 106
Dr. Šilha: Rŕznŕy vŕznam ĉeskŕyĥ pŕedloĝek v esperantu	67
R. Hromada: Al tradukantoj de poemoj	67
Sokolka. (Esp. terminoj de gimnastiloj.) (R. H.)	53
Ĉeskŕe „si“ a „se“. (R. H.)	80
Jena. (R. H.)	80
H. K. B.: Lingva trezorejo de esperanto	98
P. Stojan: Kelkaj pensoj pri la principoj de esperanto	105

DIVERSA

El nia leterujo (Dro Austerlitz, Bardiov)	10
Pri esperanta stenografio (Vuk Echtner)	13
Fervojistoj. Muzikistoj.	39
Dr. Privat: Dvŕe cestŕy svĉtovŕe reĉi. Trad O. G.	39
Vŕsem klubŕm (o Scienca Asocio) (n-ro 4)	43
De la eldonanto	54
Aŕtuno venis (Vuk Echtner)	57
Diversaĵoj	68 100, 107
Redakcia informo	80
Amuzenigmoj	37
Ilustraĵoj	29, 42, 43 (n-ro 5-6), 51



LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO : PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kč 20.— ; fremdlando Kč 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto : Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Pošta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271.

VII. VALNÉ SHROMÁŽDĚNÍ

Svazu československých esperantistů

koná se

v neděli 28. února 1926 o 8. hod. v kavárně Edison Praha-I.,
Na příkopě, 1 (roh Můstku), ve zvláštní místnosti v II. patře.

PROGRAM:

1. Čtení protokolu VI. shromáždění.
2. Zprávy funkcionářů.
3. Rozpočet na rok 1926.
4. Volby funkcionářů.
5. Volné návrhy.

Ohledně účasti na valné hromadě poukazujeme na příslušné odstavce stanov, zvl. § 16. a § 17.

V sobotu 27. února koná se v téže místnosti *přátelský večer pražského klubu* k uvítání mimopražských účastníků valného shromáždění, jejichž příjezd očekává se již v sobotu, aby nedělního dopoledne mohlo býti plně využito.

Zúčastněte se v hojném počtu. Očekáváme, že budou přítomni členové ze všech klubů.


LITERATURO

EL „GOLESTAN“ (FLOREJO)

Rakonto de Saadi.

Iu piediranto nudpieda kaj nudkapa eliris el Kufa kun Heĝaza karavano kaj fariĝis nia vojkolego. Mi kelkfoje rigardis lin, sed li nenion atentis, fiere piediris kaj ripetis:

Verso :

Nek rajde mi estas sur kamelo kaj nek sub
ŝarĝo kiel azeno,
Nek potenculo de subuloj mi estas, sed nek
la sklavo de regnestro.
Ne havas mi mizeron nune nek maltrank-
vilon pri estonto,
Trankvile spiras kaj trankvile mi finos eble
mian vivon.

Iu riĉulo rajdinta sur kamelo diris al li:
— „He derviŝo! Kien vi iras? Revenu,
ĉar vi mortas pro vojmalfacilaĵoj.“

La derviŝo tuj direktis siajn paŝojn en
dezerton kaj foriĝis.

Kiam ni atingis la oazon de Beni Mah-
mud, alvenis morthoro de riĉulo. Tiam la
derviŝo revenis, alproksimiĝis al litajo de
riĉulo kaj diris:

— „Nu jen, mi ne mortis pro vojpe-
naĵoj kaj vi mortas kun tuta via riĉaĵo.“

Verso :

Iu tutan nokton ploris
Apud kapkuseno de malsanulo,
Sed tago venis kaj li mem mortis,
Malsanulo do restis vivanta.

Multaj rapidaj ĉevaloj restis sur batal-
kampo, sed lama fiazenido hejme konservis
la vivon. Multaj sanuloj estas enterigitaj
en tombojn, kaj vundulo ne mortis.“

Aforismo :

Unu derviŝo preĝante al Dio, parolis
— „Ho mia Kreinto! Kompatu malbo-
najn homojn, ĉar bonajn homojn vi jam
kompatis kreinte ilin bonaj.“

El persa lingvo tradukis E. Rebrik.



OTAKAR BŘEZINA :

LA HOMAJ AROJ

(Zástupové.)

Ne estas soleco en la anima mondo. Ni estas senĉese ĉirkaŭitaj de miloj da homoj. La aroj de nevideblaj fratoj flustras en niaj pensoj, ni sentas ilian spiron kiel kapturnon en lokoj, kien ankoraŭ neniu antaŭ ni enpaŝis. Ili respondas al niaj duboj, ili ekardigas niajn vangojn per gloro. Ĉiu vorto, ĉiu ekstremo pro ĝojo kaj doloro estas magia sorĉesprimmo malfermanta la tombojn. Ĉiu sekundo de nia lumo estas densigita brilo de sennombraj tagoj. Por ke niaj okuloj povu sin malfermi por belo de objektoj, por brilo de l'suno, de la noktoj kaj lipoj, miloj da okuloj estis devigitaj sin fermi por ĉiam.

La riveroj, la rokoj, la maroj, la bestoj, la floroj kaj la steloj rakontas al ni pri la sennombraj fratoj, kiuj iris antaŭ ni kaj preparis al ni la teron. La metaloj, la akvoj, la fajroj kaj la fortoj metis sin en iliajn febrajn manojn, senĉese tremetantajn pro la vento de l'mistera vivo, de l'epoko al epoko pli inciteblajn kaj pli delikate sin alsuĉantajn al objektoj, kvazaŭ ili volus eksenti en ili la pulson de la eterna ritmo, en manojn, kiuj dissemadis la doloron kiel ensorĉitan grajnon, kiu ne malplimultiĝas en la mankavo, kiuj dronis en la frata sango, tremis ĝis-blanke konsumitaj per voluptoj kaj lacigoj, estante per malbeno kondamnitaj forĵeti ĉion, kion ili atingis, kaj malfermi sin sopire al io Nekaptebla, sen ripozo, dum tutaj jarcentoj, ĉiuj estante senfortigitaj de komuna laboro en unu ŝtonrompejo, ĝis la lasta rigidiĝo en agonio: kaj eĉ tiam ŝajnis, ke ili serĉas kaj displektas la delikatajn, akrajn, ĝis sango sin en-tranĉantajn fibrojn de la mortigantaj ĉaskaptiloj, en kies maŝoj ili kaptiĝis.

Niaj manoj ricevis ilian laboron, ritmon de ĝia ardo, ta tremadon de ĝia espero. En liniaj signoj sur iliaj manplatoj oni nun povas legi la estontan historion de la tero. Ĉar la propra historio konsistas en interna unuiĝo de l'milionoj al mistera laboro. En miloj de rilatoj, en kiuj la realo perceptas nur la malfortigitan reflektan. En sennombraj faloj kaj reekstaroj de la estaĵoj, en ekkonoj de l'korpo kaj de l'animo, en jena ekbriletado kaj brilado de milionoj da okuloj, kiuj sin fiksas en ĉiu epoko al sekreto de la tero, kaj el kiu ĉiu, ĉu okulo de l'saĝulo ĉu tiu de l'almozulo apud la preĝeja portalo, vidas iun nur al li propran nuancon el teruro kaj belo de l'objektoj. En renkonto de malamo kaj amo, de l'sopiro al plej alta afero kaj de la kulpo, la vivo vokas kiel gardisto dum nokto sian horsignalon en eternecon, al kiu li havas senĉese pardon malfermita pro naskiĝo kaj morto kaj per kies trablovo ĝi estas konstante refreŝigata.

Tie en profundoj de l'interna vivo oni ja perdas kaj akiras. Tie ja estas la batalejoj, en neniu landkarto notitaj kaj tamen decidantaj pri sorto de miloj. Ĉiu sekundo estas signo de venko aŭ de malvenko en iu parto de la tero, kiel ĉiu spiro ie estas akompanata de iu unua aŭ lasta ekkrio de la vivo. La animoj estas ĉiuj en mistera kunligiteco; ne ekzistas flustrataj vortoj. Ĉiu kiel ekfrapo al sonoriloj en tempo de fajregoj sonas tra ĉiuj fenestroj en ĉiujn domojn. La pensoj lasas post si fajrajn liniojn de sia flugo vidataj sur la tuta duonglobo. La stato de la hodiaŭna homaro estas ja fakte tute alia ol kiel konfesas la buŝoj, skribas la libroj kaj kredas tiom multaj inter ni; la horloĝoj de l'animoj funkcias multe pli rapide ol horloĝo de la realo; la eteraj ondoj de la psikaj speguloj reflektas jam alian kaj pli luman jarcenton ol estas la nia...

La kronikoj de reĝoj, la raportoj pli militakiritaj teritorioj, pri perfortigo de lingvoj, pri enmarŝoj en ekbruligitajn urbojn, pri kruelaj ĝojoj, kies eĥo estis silento de morto kaj malespero de miloj kaj ĉio cetera, kion notas nia historio, estas nur kvazaŭ ombroj de kaŝitaj misteraj movadoj projekciitaj sur pario. La pasinteco estas multe pli riĉa ol ni povas supozi, eĉ ĝiaj nuboj estas pli pezaj kaj fatalaj, ĝia suno pli arda kaj fruktiga. La nacio estas komuneco de vivantoj, de mortintoj kaj naskiĝontoj; en ĝiaj profundoj kuŝas heredaĵo de centjaraj ekridoj, kisoj, de koreco, de nekonataj heroismoj, de kunmetado de manoj, la testamenta postlasaĵo de malbeno kaj de sango. Sur la tero skarjatkolora post centjaraj bataladoj proksimiĝas el epokoj al ni lumaj estaĵoj de sanktaj frenezuloj, kiuj eĉ tra la fumo super bruligitaj urboj scipovis vidi alian pli gloran teron kaj proklami krucan militiron de amo por ĝin almiliti. Ilia volo influas magie nian volon, ĉar la volo estas en senĉesa neinterrompita intertuŝo de epoko al epoko; ili efikas en larĝon en samtempo, en malproksimon en tempo. Kiel de generacio al generacio estas transdonata la lingvo, same ankaŭ la rikolto da dolĉeco kaj vero, da ardo kaj ekstazo, da maldolĉeco kaj da mallumo, kiuj akompanis la vortojn. Sur la malluma fono de ĉiuj niaj pensoj reflektiĝas la bildo de la tero, ŝanĝata dum centjaroj, la alveno de l'homo kaj lia lukto kun ĝi, la paŝoj de frataj aroj marŝantaj tra epokoj, iliaj espero kaj kantantaj en eternecon, la turoj de estontaj urboj ĉirkaŭitaj de lumo, la brileblankaj mondoj elmergiĝantaj el nebulaĵoj.

Kaj kiel miloj staras ĉirkaŭ ni ĉe la unua veikiĝo de niaj spiritaĵoj okuloj, tiel ankaŭ en ilia plej alta ekbrilo, kiam la revo pri estontaj jarcentoj kiel ĉarma pejzaĝo elkreskas sur dezertoj de nia sopiro, ekbruligitaj de ardo de nia spiro, ni ekflamiĝas per gloro de la vivo, kiu justa kiel suno en unu sola luma ondo disfluas tra la mondo de sennombraj

homoj. Ĉiujn liberigi! Ke miloj da fratoj povu vidi tion, kion el eterneco ekvidis unu je favoraj kondiĉoj. Kion en ebrieco de amo scipovis pardoni unu homo, ke tion scipovu pardoni miloj. Ke ili scipovu ami kiel la pli fortaj kaj malami nur tion, kion malamis la plej grandaj sanktuloj inter ni! Ke la miloj scipovu ekposedi la objektojn kaj regi ilin kiel la plej grandaj venkintoj kaj disdoni ilin kun reĝa donemo al fratoj, kiel tiuj kiuj ekkonis la dolĉecon de la nobla malŝparemo de amantoj! Ke venu tempo, en kiu tie, kie ni hodiaŭ scipovas venki per la ideo, ni scipovu venki per la korpo, bela ideo ŝanĝita en belan movon, ĉirkaŭpreno de brakoj, urboj kun nebulo kaj lumo ŝanĝitaj en urbojn el marmoro kaj oro, la momenta ekrido de suno en la tago de nura lumo. Evoluo, kie la vivo konsistos el ĝojoj, kiuj reprezentas ĝis nun al ni senfortuloj dolorojn, kaj el doloroj, kiuj estas al ni neperfektuloj ĝis nun ĝojoj. Ĉar kun pli alta vivo evoluas ankaŭ pli alta valorigado de aferoj. Kaj la plej alta vivo estas tiu, en kiu la ĝojo estas disĵetita kiel lumo super miloj da fratoj, sed la doloro el miloj da frataj animoj estas alprenita de unu forta animo, kiu scipovas ĝin transformi en benon. Kiu trovos la vortojn por skribi la historion de tia vivo? Sed ĉu la historio ne celas al tio, ke venu la tempo, kiam estos nek eble nek necese skribi la historion?

Por kredanto ĉiuj sortoj de miloj vidigas misteran kunligitecon. Ni ne komprenas ĝin, kiel ni ne komprenas la plej altan justecon. Ni ne komprenas ĝin, ĉar jena parto de la historio, kiu okazas en tempo kaj spaco estas malgranda en komparo kun tiu, kiu okazas ekster la tempo kaj spaco. Kaj eĉ el la videbla parto kelkaj okazaĵoj venas tro glorie kaj neantaŭvidite, tiel ke ili eĉ ne trovas okulojn, kluj havus sufiĉe da forto vidi ilin kaj konservi por estonta tempo. Krom tio la ĝisnuna historio de kelkaj jarcentoj ne sufiĉas al difino de leĝo, kiu regas la vivon de nia stelo, fonditan per sennombraj jarcentoj. Sed jam el tio, kion ni vidas kaj antaŭsupozas, el tiuj sangoplenaj fulmotondroj kaj brulkatastrofoj, el silenta suferado de sennombraj homoj kaj el febreco de profetaj okuloj ni ekkonas la ardajn ektuŝojn de l'Eternulo, la brulantajn alproksimiĝojn de fero blanke ardigita al venenigitaj vundoj, la sanigantan spiron de misteraj suktoj, maturiĝantaj sub stelaro de sanktaj noktoj. Grandaj kaj pro amo ardantaj vortoj flugis jam multfoje super niaj kapoj kaj postlasis silenton de malĝojo kaj konfido en la animoj de tiuj, kiuj scipovis aŭdi ilin. La silenton de malĝojo, ĉar ili vidis, kiel malproksime estas ankoraŭ la pura forta vivo kaj kiom da brulkatastrofoj, doloroj kaj fulmotondroj nin ankoraŭ atendas. La silenton de konfido, ĉar ili sciis, ke la venko ĉiam apartenis al tiuj, kiuj komprenis la plej altan volon, ke en la sanktaj

manoj eĉ la sekiĝintaj branĉoj ekfloros kiel lilioj, kaj ke la rigardoj de amantoj parolas per magia lingvo, kiu regas super animoj kaj okazaĵoj.

Post permeso de l'aŭtoro tradukis
Rudolf Fridrich (Brno).

Otakar Březina, honora doktoro de filozofio, simbolista kaj mistikista poeto ĉeĥa, naskiĝis en 1868 kaj vivas en Jaroměřice en okcidenta Moravio. Laŭ lia himna kaj viziule profeta poezio oni povas kompari lin al Walt Whitman aŭ Emile Verhaeren. La muziko de lia verso, la riĉa lingvo, la majstra formo kaj noblaj sociaj kaj moralaj ideoj kaŭzas, ke oni vidas en li unu el plej grandaj poetoj tutmondaj.



FELIĈO

En tataro vilaĝo loĝis iam maljunulo kun maljunulino, kiuj ne havis infanojn. Kiam ili jam tute perdis la esperon, naskiĝis al ili subite filino. Ili tiel ekĝojis, ke ili nomis ŝin „Feliĉo“. Feliĉo estis tre beleta knabino, sed malfeliĉe ŝi ne havis la okulojn, tio estas, ili estis fermitaj kaj ne povis malfermiĝi. La gepatroj multe malĝojis pensante, ke ŝi estas blinda, ĝis kiam unu belan tagon la patrino ekvidis sur la supro de la knabina kapeto grandan bluan okulon, en kiu respeguliĝis la ĉielo, ĉar ĝi rigardis ĉiam ĝuste la ĉielon. De tiam ili estis tute kontentaj.

Feliĉo kreskinte fariĝis ĉarma knabino; oni ŝin edzinigis kun bona viro kaj ŝi naskis la infanon, kiun ŝi tre amis. Ŝi ĉiam levadis ĝin alte al la ĉielo super sia kapo por admiri ĝin per sia sola okulo kaj poste ŝi forte kisadis ĝin. Sed unufoje ŝi foriris el la domo por afero, lasinte la infanon hejme. Kiam ŝi revenis, ho teruro, la infano estis for. Kvazaŭ freneza forlasis Feliĉo sian hejmon kaj kuris serĉi sian infanon.

De tiam ĝis nia tempo Feliĉo vagas tra la vasta mondo. Kiun ŝi renkontas, tiun ŝi kaptas, levas alte al la ĉielo... Sed ne, ĝi ne estas ŝia infano kaj en la malespero Feliĉo ĵetas ĝin sur la teron kaj forkuras.

El rusa lingvo (fragmento el la romano de Šepkina-Kupernik) trad. V. Vozdvijenskij.

JUS APERIS

ORIENTO

La 1-a N-ro enhavas 110 (centdek) p. de interesa legaĵo pri Hinujo, Japanujo, Koreujo, Formoso, Mongolujo kaj Tibeto, Siberio. Legendoj el historio, el kultura vivo, Japana eduksisistemo, Familia vivo, Tibeta medicino ktp. ktp.

Ilustrita. Riĉa enhavo.

Redaktoro J. Serišev; Eldonas „Eldona Kompanio „Oriento“ en Harbin (Hinujo).

Havebla ponumere (20 Kč) ĉe

LA PROGRESO PRAHA VII Sochařská 333.

EL SCIENCO

El Scienco, nia grava rubriko ĉiunumera havas du celojn: 1. Doni al niaj legantoj la eblon akiri bonan scion de la teknika lingvo. Gravecon de tio ĉi egale grandan por la Esperantistoj individuaj same kiel por la Esperantisma movado trafe klarigis s-o R. Hromada jam en unua jarkolekto de la Progreso. Relego de lia tion koncernanta artikolo estas tre rekomendinda al multa Esperantisto, eĉ al multa brua propagandanto. — 2. Ni ĉiuj instruante ankaŭ mem lernas. La teknika lingvo ricevas per regula aperado de teknikaj artikoloj pluan elastecon kaj konstantecon. — Tial du estas normoj, kiujn ni obeas en tiu ĉi rubriko: 1. Scienceco de niaj artikoloj. Tio signifas, ke ni klopodas esti kompreneblaj al ĉiu, kiu lernis logike pensi. Estas ĉefa signo de la scienca vero, ke ĝi estas klara kaj estas pruvo de ĝia bona kompreno scii klarigi ĝin al ĉiu kompreneble. El tio sekvas ankaŭ nia evidenta bezono, ke niaj informoj estas ĉiam fidindaj. — 2. Ni klopodas doni niajn prisciencajn informojn en lingvo klara, sed ĉiam kiom eble plej logika kaj plej ĝusta. Ni evitas laŭ plej bona povo homonismojn, sinonimojn, popolan etimologion, idiotismojn. Precipe ni evitas krei novajn vortojn, se ili jam estas troveblaj en bona Esperanta literaturo. Sed same energie ni evitas uzi malbonajn, nelogikajn aŭ netaŭgajn vortojn kaj parolturnojn, eĉ se ili estis jam ofte uzitaj. — Por esti kiom eble plej multe interesaj por ĉiu, ni klopodas ĉiam artikolon natursciencan sekvigi de humanescienca. Ni estos feliĉaj, se baldaŭ anonciĝos multaj kunlaborantoj.

S. K.



Dr. Stan. Kamaryt:

PROGRESOJ ĈE UZO DE KARBO.

Daŭra ekonomia krizo en karbominejoj rezultas el tio, ke la tekniko de hejtado, rapide progresante, scias uzi brulŝtofojn ĉiam pli ekonomie, estu ili eĉ de tre malalta kvalito, kaj tiel ĝi ŝparas relative tre grandajn kvantojn da karbo. Same efikas la rapide kreskanta eluzo de akvaj fortoj, liveranta daŭre altigantajn kvantojn de elektra energio. Savon al la karbminado povas alporti sole kemia teknologio, kaj efektive jam alportas ĝin kun tre rimarkindaj rezultatoj.

Dum la lastaj 20 jaroj oni nerefuteble pruvis, ke oni tre malekonomie uzas karbon bruligante ĝin simple sub kaldronoj. Karbo devas esti rigardata

kiel tre valora kemia krudaĵo, el kiu oni povas ricevi multajn gravegajn substancojn. Jam disigante ĝin per seka distilado je lumgaso, gudro kaj koakso oni uzas ĝin pli ekonomie. La gaso ne sole lumigas, sed ankaŭ tre ekonomie hejtas kaj movigas malgrandajn motorojn, koakso estas pro koncentriteco de sia karbono multe pli ekonomia hejtaĵo ol natura karbo, kaj gudro enhavas vicon de tre gravaj organikaj substancoj. La malkarigon de gaso por hejtado oni atingas fabrikante t. n. „akvan gason“ per influo de akva vaporo je ardanta karbo; ĝi estas miksaĵo de hidrogeno kaj karbonunuoksido. Grava kromprodukto de karbondistilado estas ĉiam amoniako.

La substancoj enhavitaj en karba gudro estas plejparte hidrogenkarbidoj el serio de benzeno (C_6H_6), kiuj inter ĉiuj hidrogenkarbidoj estas la plej malriĉaj koncerne hidrogenon. Tial bruligate en motoroj, ili tro fulgas kaj estas sekve ne samvalora surrogato de plikosta benzino; tiu ĉi estas miksaĵo de hidrogenkarbidoj alifatikaj de metana serio, plej riĉaj je hidrogeno, kaj tial ĝi ne fulgas kaj havas pli altan brulvarmon ol benzeno. Benzino estas fabrikata el nafto, kaj ĝia prezo daŭre kreskas pro ĝia diversmaniera uzobleco.

Sed dum la lastaj esploroj oni venis al la rezultato, ke la karbo distilata dum malalta temperaturo (sub $600^\circ C$) kaj sub malgranda premo liveras gudron konsistantan el hidrogenkarbidoj benzinaj kaj el bonaj ŝmiroleoj. La rezultatoj estas tre kuraĝigaj, ĉar ambaŭ tiuj produktoj povas laŭ prezo tre bone konkurenci kun benzino kaj oleoj el natura nafto.

Sed la esplora laboro ne ĉesis ĉe tiu sukceso, ĝi klopodis fabriki senpere el karbo eĉ derivatojn de hidrogenkarbidoj. Ankaŭ tio sukcesis, kaj estas valora atesto pri sciencoco de uzataj metodoj, ke la invento okazis samtempe en diversaj landoj. Sukcesis sintezo de karbonunuoksido (CO) kaj hidrogeno je metilalkoholo ($CH_3 OH$). Ĝi estiĝas per efiko de katalizatoroj kaj alta premo. Metilalkoholo (ĝia teoria nomo estas metanolo) estas likvaĵo ĥolanta ĉe 64° , tre uzata en kemia teknologio. Ĝis nun ĝi estas fabrikata per seka distilado de ligno. La nova sinteza metodo liveros produkton multe pli malkaran, ĉar la eliraj substancoj estiĝantaj el karbo kaj akvo (supre menciita akva gaso) apartenas inter la plej malkaraj materialoj. La granda germana kemia uzino „Badische Anilin- u. Sodafabrik“ fabrikas jam metilalkoholon laŭ tiu metodo, kaj eksportis en Amerikon ekz. en marto 1925 kvanton de 69.886 galonoj; ĝia prezo kun limimposto estis 59 cendoj, dume amerika metilalkoholo el ligno kostis 65 cendojn.

Sed en Francujo, unu uzino laboras sukcese pri alia alkoholo. Ĝi produktas el etileno (C_2H_4), enhavita en lumgaso (5%), etilalkolon. Ankaŭ tiu ĉi procedo liveras bonajn ekonomiajn rezultatojn kaj faras la distiladon de karbo pli profitdona, disponigante samtempe al la tekniko gravajn substancojn en rimarkinde pli grandaj kvantoj ol la ĝisnunaj metodoj.

Brulŝtofo palivo. Krudaĵo surovina. Gudro dehet. Koakso koks. Hejtaĵo topivo. Karbono uhlík. Hidrogeno vodík. Karbonunuoksido kysličník uhelnatý. Kromprodukto vedlejší výrobek. Brulvarmo spalné teplo. Invento vynález. Metilalkoholo = metanol = alkohol metylnatý. Etilalkoholo alkohol etylnatý, obyč. lih, Likvaĵo tekutina, Uzino továrna.

EL ĈEĤOSLOVAKIO

Se iu el tiuj ĉi koncizaj notoj speciale interesas iun el niaj eksterlandaj legantoj, la redakcio povas pri detalan informon.

— Post balotoj la 15 Novembro 1925, nova registaro konstituigis en ĈSR la 10 Decembro: Ĉefministro *Švehla* (agrara partio), eksterlando Dro *Beneš* (ĉs. socialisto), interno Dro *Nosek* (popola, katolika), instruado Dro *Srdínko* (agrara), justeco Dro *Viškovský* (agrara), komerco Dro *Dvořáček* (nacia demokrato), fervojoj *Bechyně* (soc. dem.), publikaj laboroj *Mlčoch* (partio de komercistoj kaj metiistoj), terkulturo Dro *Hodža* (agrara), nacia defendo *Stříbrný* (ĉs. socialisto), sociala zorgo Dro *Winter* (soc. dem.), higieno *Tučný* (ĉs. socialisto), poŝtoj Mr *Srámek* (katolika), popola provizado Dro *Dolanský* (katolika), unuigo de leĝaro Dro *Děrer* (soc. dem.), financoj Dro *Engliš* (sen partio), Slovakaĵaj aferoj Dro *Kallay* (sen partio). Sekve la agrara partio havas 4 ministrojn, katolika 3, ĉs. socialistoj 3, socialaj demokratoj 3, naciaj demokratoj 1, metiisto-komercista 1, du ministroj estas ekster partioj, entute 16 ministroj.

— Post la *unua kunsido* de la parlamento antaŭ Kristnasko, dum kiu la unuigita opozicio faris bruajn scenojn, daŭras longa *paŭzo*, ĉar ne povas esti atingita ia interkonsento pri prezidantaro de la Senato, kiun aspiras unuflanke la socialistaj partioj kaj aliflanke la partio katolika.

— Inter la laboro traktota de la parlamento troviĝas *leĝoprojektoj* pri salajrado de ŝtatoficistoj kaj pri vigligo de leĝejkonstruado. Estas ankaŭ preparita leĝo pri sociala asekuro de labornekapablaj personoj pli ol 65 jaraĵ. Tio rilatas 80.000 personojn kaj kostos ĉ. 40.000.000 Kronojn. (pli ol 6 milionojn da sv. fr.)

— La ĉeĥoslovaka gazetaro multe sin okupas pri la hungara *falsista afero* rememorigante ke sisteme Ĉeĥoslovakio suferis grandan perdon pro falsado de 500kronaj bankbiletoj de hungara deveno.

— *Ĉeĥoslovakaj arkeologiaj trovoj en Malgranda Azio*. La ĉeĥoslovaka misio gvidata de D-ro Bedřich Hrozný, profesoro de universitato en Praha, finance helpata de la prezidanto T. G. Masaryk, de la ministerio de instruado kaj Akademio de sciencoj, de industriaĵ kaj bankaj rondoĵ de Praha faris gravajn arkeologiajn trovojn en Malgranda Azio, en monteto *Kültepe*, proksima al la urbo Kaisaria (sudoriente de Angora). Estis tie trovita urbo malnova 5000 jarojn, kies nomo verŝajne estis *Kaneš*, kaj kiu estis metropolo de ĉiuj kapadociaĵ urboj, regataj de Asirio. Proksime al la urbo estis malkovrita bone organizita *arkivo* de argilaj tabuletoj kun kojna skribo en la malnovasiria lingvo, el la tempo ĉ. 2.100 jaroj a. K. Ili enhavas korespodadon de asiriaĵ grandkomercistoj, negocantaj kun la tuta Malgranda Azio kaj Mezopotamio (mendoj, fakturoj, kontraktoj, impostoj, tribunalaĵ procesoj ktp.). Kune kun fragmentoj estis trovitaj 1000 tabuletoj, inter ili ankaŭ multaj enfermitaj en argilaj kovertoj, provizitaj per sigeloj, havantaj grandan valoron arkeologian. La studo de la arkivo certe heligos la kulturan historion de la plej antikva Malgranda Azio kaj klarigos plurajn misterojn de la asiria lingvo. Ĝis nun ne tre funde esplorita. En la daŭro de la

fosado montriĝis ke la arkivo estas sole parto de nova, granda, ĝis nun nekonata kvartalo de urbo Kaneš.

— Inter la lernantoj de la duagradaj lernejoj en ĈSR ĉiu dudeka estas senkonfesa, ekstere religio. En Bohemio ĉiu naŭa, en Slovakio unu el cent.

— En *hokeja konkurado* en Davos Ĉeĥoslovakio akiris duan lokon; la unua estas Svislando, la tria Aŭstrio.

— Ĉeĥa violona virtuoza *Kubelik* koncertis nun en Portugalio, kie li estis akceptata entuziasme.

— Dum Kristnasko naskiĝis en Praha knabeto, kies koro estis *ekster la brusto*. Li vivis 7 tagojn, dum kiuj la funkciado de la koro estis science filmita. Tiu filmo ebligas sekvi la funkciadon de koro deponita la naskiĝo ĝis la morto. La medicina mondo de la tuta Eŭropo havas intereson pri tiu ĉi okazo, tre malofte, ĉar ĝis nun sole 4 similaj strangaĵoj estas konataj.

— En *eksterlando vivas* preskaŭ kvinono da Ĉeĥoslovakoj. Plej multe en USA: pli ol 1,242,000, en Aŭstrio pli ol 300 miloj, en Hungario preskaŭ 200 miloj, en Jugoslavio (SHS) 138 m., Germanio 70 m. Entute vivas ekster la ĉs. respubliko 2,136,500 Ĉeĥoslovakoj.

— *Informojn pri Ĉeĥoslovakio* enhavas diverslingvaj enciklopedioj: En *Danlando* nun aperas granda enciklopedio „Hagerup's Konversations Leksikon“, en kiu la informoj pri Ĉeĥoslovakaj aferoj troviĝas en bona elekto kaj notinda amplekso. En la IX. volumo S-to C. E. Hansen verkis 14kolonan informon, akompanatan per landkarto kun ĝusta terminaro kaj 9 fotoj. — En *Hispanio* aperas ampleksa enciklopedio *España*, kun riĉaj informoj verkitaj de nia samlandano prof. Slabý, vivanta en Barcelona. — En *Jugoslavio* oni komencis publikigi enciklopedian vortaron „Narodna Enyklopedia“. Pri ĉs. informoj kunlaboras tie Dro Pavlova, docentino de sudslava historio ĉe la universitato de Praha.

— *VIII. grandioza manifestacio de ĉs. gimnastoj Sokoloj* estos la Sokolaj tagoj en Praha, de 5. Junio ĝis 6. Julio 1926. La sumo de partoprenontaj gimnastoj estas 125 000 (117.000 en 1920). Sur plataĵo, okcidente super la urbo estas konstruata Stadion, kies ekzercejo havos lokon por 14.000 ekzercantoj, tribunoj kaj starlokoj antaŭ ili povos enteni preskaŭ 130.000 rigardantojn. La tuta buĝeto donas ciferon de 14 milionoj da Kč (pli ol 2 milionoj da sv. fr.). Ĉiuj membroj de Internacia organizaĵo gimnasta estas invititaj, el Ameriko venos granda karavano de 20.000 Amerikaj Ĉeĥoj. En la ĉefa tago, la 6. Julio, grandega marŝo de ĉiuj Sokoloj iros tra Praha al la monumento de Jan Hus, antaŭ la Urbdomo. Estas memkompreneble, ke inter la centmiloj da Sokoloj, gastoj kaj vizitantoj estos ankaŭ multe da esperantistoj. Jam nun ni ricevas informojn el diversaj lokoj kaj Esperantista Klubo de Praha (Příkopy, kav. Edison) ĝoje preparos specialan kunvenon kaj ĉiurilate faciligos la restadon en Praha, ĉe tiuj tagoj plenplena.

Varbu novajn abonantojn!

ESPERANTISTA MOVADO

ALVOKO DE PROFESOROJ

(R. Fr.) La Esperantista Sekcio ĉe Centra Asocio de ĉeĥoslovakaj profesoroj de duagradaj lernejoj en sia ĝenerala kunveno okazinto dum Kristnasko 1925 en Brno akceptis sekvantan rezolucion:

Gepatroj, instruistoj, profesoroj!

Estas necese reformi la lernejaron kaj precipe haltigi la alfluegon de fremdaj lingvoj, kiujn oni povus studi nur per pasiva metodo. La menso de lernanto ne estas ekzercata per neregulaj verboj, por kiuj sufiĉas nur memorkapablo.

Male, Esperanto estas lingvo mirinde logika, vera enkonduko al la hindo-eŭropaj lingvoj. Ĝi ekzercas pli bone ol la latina aŭ iu ajn lingvo en la preciza pensado. Estante belsona, fleksebla kaj facila ĝi estis kaj estas ĝojiga lernobjekto, kie ajn oni ĝin instruis kaj instruas.

Enkonduki Esperanton en lernejon, jen la paŝo al Unio de l' mondo. De la apostolo kaj genio Zamenhof estis kreita afero de sana racio kiel esprimo de urĝa socia neceso.

Ni konas ĝian praktikan gravecon, ni estas konvinkitaj pri ĝia morala valoro.

Lernu Esperanton! Instruu ĝin al viaj infanoj!

Esperanta sekcio ĉe Centra Asocio de ĉeĥoslovakaj profesoroj de duagradaj lernejoj en Praha.

Rudolf Fridrich, *Dr. Stanislav Kamaryt,*
profesoro de gimnazio profesoro de reala lernejo
en Brno-Královo Pole, en Bratislava,
prezidanto. *sekretario.*



AL NACIAJ SOCIETOJ

Scienca sekcio de Ĉs. Asocio Esp. konstituigis laŭ decido de la komitato. Ĝia unua tasko estas zorgi pri efektivigo de la dezirospriroj en la Pariza Scienca konferenco. La unua entreprenita paŝo estas la petskriboj senditaj al Ĉeĥa Akademio (Česká Akademie věd a umění) kaj Reĝa Societo de sciencoj (Královská společnost nauk); oni petas en ili, ke la redakcio de „Revue des travaux scientifiques tchécoslovaques“ permesu publikigi la resumojn de ĉeĥoslovakaj sciencaj verkoj krom en la angla aŭ franca lingvoj ankaŭ en esperanto. — Samtempe per specialaj leteroj la Sekcio petis la koncernajn membrojn de la Honora Komitato de ĈAE, ke ili petu ĉe la nomita redakcio publikigon de resumoj de siaj verkoj en esperanto. — Alia tasko de la Scienca

VĚSTNÍK

SVAZU ČESKOSLOVENSKÝCH ESPERANTISTŮ PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.
ČÍSLO 7. LEDEN 1926.

Estimata samideano,

la esperantista movado, konstante kreskanta en nia lando, per taskoj ĉiam pli gravaj kaj ampleksaj. ŝarĝas nian centran organizaĵon, kiu estas

ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA.

La internacia organizaĵo UEA, havanta ĉe ni specialan reprezentanton por varbado de membroj, varbis en ĈSR pli ol 1100 membrojn.

Nia Nacia Asocio

ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA BEZONAS
ALMENAŬ 1000 MEMBROJN.

ALIĜU KIEL ĜIA MEMBRO

kaj sendu la negrandan kotizon (aktiva membro 16 Kč, helpa 50 Kč jare) per pagilo, kiun postulu laŭ suba adreso, aŭ per pagilo de La Progreso.

KIAL ?

Por ke vi, kiel amiko de la lingvo internacia, helpu al ĝia *propagando* ĉe ni.

Por ke vi ricevu senpage *Bultenon*, kiu informos vin pri tio, kiun laboron vi ebligis per via kotizo.

Por ke vi ricevu senpage, kiel *premio*, *broŝuron* 48paĝan *Svaz národů o esperantu*, kiu liveros al vi kaj al viaj konatoj oficialajn, fidindajn informojn pri la stato de esperanto en la tuta mondo. Premio por malnovaj membroj estos anoncita.

LA FIKSITA CELO: 1000 MEMBROJ DE ĈAE

povas esti atingita, se aliĝos ankaŭ VI!

Subtenu la sindonan laboron de tiuj, kiuj por la nobla ideo dediĉas ĉiun liberran momenton.

ESTU ANKAŬ VI UNU EL TIU MILO!

ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

Praha VII., Sochařská 333.

III. ĈEĤOSLOVAKA KONGRESO

1—2. majo 1926 en Bratislava. — La urbestro akceptis la protektoraton de la kongreso. — La urbo senpage pruntis la plej belan salonon en la urbo „Spegulan ĉambron“ en Primasa Palaco. — Granda intereso pri la kongreso en nia Respubliko.

La plej bela vetero en Bratislava estas en printempo. Ĝia jarmeza temperaturo estas 9.4° C, je 0.9 pli ol en Bohemia centro. Ofte dum fino de februaro vidiĝas la unuaj simptomoj de la printempo. Tial la unuaj tagoj majaj estas la plej taŭga momento por ĝui la mirindajn panoramojn de la urbo, kuŝanta laŭvorte inter bone kulturataj ĝardenoj kaj vinberoj. Norde milda montoĉeno de Malgrandaj Karpatoj ŝirmas la urbon kontraŭ malvarmaj ventoj, sude etendiĝas fruktodona ebenaĵo de la insulo Žitný. De la rigardpunktoj en la Montara parko oni ĝuas multajn ne facile forgeseblajn panoramojn de la grandurbo, kuŝanta sub niaj piedoj tiel, ke oni sentas la vibradon de ĝia diversmaniera vivo; promene sur la alia bordo de Danubo, oni estas impresata de nekutima ruino de mezepoka kastelo, aroj de blankaj dometoj sidigitaj en la verdo de vinberaj deklivoj, imponaj publikaj konstruaĵoj, vaporŝipoj trenantaj vicon de ŝarĝboatoj, havenaj krikegoj transportantaj fervojajn vagonojn de sur la reloĵoj en ŝipon. Sed se vi foriras kvaronhoron de tiu ĉi aspekto, vi povas apud iu riverbranĉo aŭdi tiom da najtingaloj, kiom vi neniam aŭdis. Vi konvinkiĝos, ke la najtingala kanto, pri kiu oni fablis en la lernejo, ekzistas efektive.

Bratislava havas nun 100.000 loĝantojn; sed la areo de la urbo estas rilate granda, ĉar ekzistas multaj unufamiliaj domoj de vinberistoj eĉ de bonstaj privatuloj. Situaĉia plano de la urbo estas rimarkinda. Mallarĝa strato Michalská estas sidejo de ĉefaj komercejoj kaj luksaj magazenoj; ĝi estas agrabla promenejo pro sia ombreco.

Paralele kun ĝi etendiĝas vasta placo de la Respubliko, la plej taŭga foirplaco, plena de suno, simplaj butikoj, vendistoj de legomoj kaj fruktoj, scenejo de la vigla tienkaj reen-irado, la plej ĉefa irejo de la urba trafiko. Ambaŭ fluoj trafikaj kunfandiĝas sur

la kajo inter impona ponto kaj propelerstacio. Kiam dum varmeta vespero, amaso da Bratislavanoj promenas sur la kajo antaŭ la kafejo Reduto, la kafejaj tabletoj sur Reduta trotuaro estas plene okupitaj, el la kafejoj sonas melodioj de cigana orkestro, la elektraj lampoj brilas el ĉiuj apudaj fenestroj, la Danuba akvo flustras kanton, kies sencon ĉiu laŭ sia propra maniero komprenas, sur alia bordo, el kie flugas same gajaj melodioj longa vico de lumetoj tremetas, ŝipeto transportanta ridantajn homojn de unu bordo al la alia similas ŝipon fantoman, jen la momentoj, kiujn vi ne ofte ĝuos aliloke. Ĉiuj virinoj ŝajnas tiam belaj ĉiuj viroj dezirindaj.

Bratislava estas urbo antikva. La interna kvartalo estas plena de rimarkindaj arkitekturaj. Ĝi estas urbo burĝa. Tial precipe burĝa domo estas rimarkinda. Promene tra stratoj Dlhá, Ventúrova, Konventská, Panenská, preskaŭ ĉiu domo povas vekian intereson estetikan; precipe multaj belegaj portaloj estas troveblaj. La plej bela fasado estas tiu de la Primasa palaco; en ĝia „spegula ĉambro“ okazos la kongresaj kunvenoj. La plej malnova konstruaĵo estas la gotika kapelo de St. Johano el 1361. La suba parto de la urbdomo estas ankoraŭ pli malnova, el 1288; sed ĝia plej bela parto estas baroka tegmento sur ĝia turo el 1720. En la gotika ĉefpreĝejo estas vidinda la statuo de R. Donner (el 1735); la preĝejo mem estas tre impona konstruaĵo kaj ĝia lokiĝo inter la antikvaj burĝaj domoj kaj patriciaj palacoj estas tre impresa.

La rapida disvolvo de la urbo post la ŝtata renverso kaŭzis sukcesan periodon konstruan, kiu ankoraŭ ne estas fininta. En eksteraj stratoj estis konstruitaj grandaj domoj luaj, alie estiĝis belaj kolonioj de familiaj dometoj, nombro de komfortaj restoracioj pli-

grandiĝis, la vivo fariĝis pli intensa.

Sed nia urbo ne estas sole urbo de estetika ĝuo, prihistoria revado, cigana muziko, ardanta suno, gajaj promenadoj, fajra vino. Bratislava estas ankaŭ urbo de intensa laboro. La kabbofabriko estas la plej granda en meza Eŭropo. La uzinoj de a. s. Dinamito-Nobel fabrikas diversajn kemiaĵojn, precipe acidojn sulfatan, nitratan kaj sulfurduksidon. Antaŭ du jaroj ili fondis grandan sukerfabrikon, nun ili konstruas fabrikejon de kemiaj sterkoj. Ali-aj firmoj fabrikas gumajojn, elektroteknika-lojn, ĉokoladon, lanŝtofojn, armilojn, bierojn k. m. a. La haveno ĉiujare pligrandigas sian rezulton, Internacia danuba foiro daŭras zorgi pri kunligo interfabrikantoj kaj konsumantoj, — efektive nia urbo ne bezonas honti inter diligentuloj.

Pro du kaŭzoj, kara leganto, mi rakontis al vi pri Bratislava. Unue, ĉar mi volonte babilas pri mia aminda urbo. Due, ĉar mi konsilas al vi, vidi tiun ĉi vidindan urbon. Dum la III. ĉs. kongreso esperantista vi havos okazon por tio. Jen la

Programo:

Vendrede, la 30. Aprilo

Vespere: senprograma kunveno en restocio, promeno, je la 22. horo vizi-
to ĉe samjara vino (t. n. heuriger)

Sabate, la 1. Majo

Je la 10: Solena malfermo de la kongreso
Je la 15: Komedio en kino, kun sole es-
perantaj surskriboj (unuano fo-
jon en la mondo)

Je la 17—19 Labora kunveno

Je la 20: Komuna vespermanĝo, po 15 Kĉ,
amuza programo, sen enirpago

Dimanĉe la 2. Majo

Je la 8: Diservoj katolika kaj protestanta

Je la 9-12: Labora kunveno

Je la 15: Teatra prezentado

La loka komitato zorgos pri malkaraj manĝoj kaj loado. Vi povos ĉion antaŭmendi. Tagmanĝo kostos: unuaranga 10 Kĉ, dua-
granda 6-50 Kĉ; sed ankaŭ tiu ĉi duaranga estos en bona restoracio, kaj se vi ne nepre bezonas lukson, prenu trankvile tiun ĉi.

Ĉiujn informojn donos la sekretario de la Loka Kongresa Komitato S-ro H. Kesiĉ,
Bratislava, Radnica 93a. S. K.

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista havas la honoron *inviti* ĉiujn ĉs. esperantistojn kaj amikojn de esperanto al la III. ĉs. kongreso, okazonta en Bratislava, la 1.—2. Majo 1926 kun la programo, supre sciigita.

Antaŭ ol ni starigos programon por laboraj kunvenoj ni ŝatos legi proponojn de niaj membroj. Bonvolu sendi ĉion, kio rilatas la laborajn kunvenojn senpere al nia Asocio, antaŭ la 27. Februaro 1926.

Protektoraton de nia kongreso akceptis la Urbeŝtraro de Bratislava, kiu ankaŭ senpage pruntis la „ŝpegulan ĉambron“ en Primaŝa palaco.

La vigla laboro de la Loka Komitato rajtigas nin esperi, ke ni ĉiuj trovos plenan kontenton per la aranĝoj kongresaj kaj dependas do nur de ni ĉiuj, ke ni en la plej granda nombro venu, por interkonatiĝo, por interkonsiliĝo kaj eĉ amuzo. Ni troviĝos tie en rondo internacia, ĉar venos ĉeĥoj, slovakoj, hungaroj kaj germanoj, plie gastoj ĉeĥaj kaj germanaj el Vieno. Faru do jam nun viajn preparojn. Aliĝiloj estos almetitaj al la venonta numero.

Ĝis la revido en Bratislava!

Ĉ. A. E.

KRONIKO EL ĈEĤOSLOVARIO

Laŭ informoj ricevataj de Ĉs. Asocio Esp.

NOVAJ KURSOJ

Ĉervený Kostelec. Kurson por 24 p. gvidas S-ino Keyzlarová.

Hradec Králové. S-ro Lukáš gvidas kurson por 16 progresintoj, en YMCA.

Jaroměř. Kurson por 16 p. gvidas F-ino Scharfenbergerová.

Jičín. En kurso por 8 personoj instruas S-ro Kudrna.

Jilemnice. Kurson por 18 progresintoj gvidas S-ro Štěch.

Mor: Ostrava. Kurson por 17 fervojistoj gvidas F-ino A. Černožorská. Post la kurso oni intencas fondi fervojistan rondeton

PUBLIKAJ PAROLADOJ

Kroměříž. La 24. Jan. faris propagandan paroladon antaŭ ? personoj nia nova oratoro D-ro Pošpíl el Olomouc. M. M.

Videble ni ne ricevis ĉiujn informojn pri kursoj kaj paroladoj okazintaj en januaro. Tial ni petas refoje ĉiujn, kiujn ĝi rilatas, ke ili sendadu al ni regule informojn pri ĉio grava, kio okazas ĉe ili Red.

LOKAJ RAPORTOJ

Ústí nad Orlicí. La ĝenerala kunveno de la Klubo okazis la 3. Januaro 1926. La komitato estis jene elektita: Prez.: *Barkman*, Vicprez.: *Bergman*, Sekr.: *Andresová*, Kas.: *Picková*, Bibl.: *Velimská*, komitatanoj: *Láska*, *Kymr*, *Michálek*, *Velebilová*. kontrola komisiono: *Berger*, *Hromádko*, *Fišarová*;

La kurso, komence por 20 p., poste por 28 p. estis finita la 21./12. Finan ekzamenon plenumis 13 lernantoj (duhora parola kaj duhora skriba ekzameno), ses premioj libraj en valoro de 100 Kč estis donitaj al la plej bone sukcesintaj. — Samtempe estis farita de S-ro *Vašíček* parolado pri la nuna stato de esp. organizaĵo, (ĈAE, GEL, UEA, fakaj organizaĵoj), kiun partoprenis, krom 8 klubanoj, 16 kursanoj; ĉiuj ĉi 16 kursanoj aliĝis al la klubo. — Al la loka gazeto la klubo sendis 12 informojn pri esperanto, ĉiuj 12 estis publikigitaj.

Nymburk. Pri la signifo de esp-o S-ro Tyl parolis al komunista junularo. — Anstataŭ la mortinta fraŭlino *Mojžišová*, la klubo elektis kiel kasiston S-ro *Emil John*.

Liberec. Ĉeĥa esperantista Klubo havas 36 m. En la komitata kunveno de DTJ (Laborista Gimnasta Societo) S-ro *Haase*, prez., parolis pri esp-o. La ĝen. kunveno la 29/1 elektis: *J. Haase*, prez.; *St. Knížek*, vicprez.; *R. David*, sek.; propaganda fakestro *Teo Novotný*.

Slezská Ostrava. La Rondeto aranĝis sabate la 16. Januaro unuan hejman balon, por helpi financojn de la Rondeto.

Hradec Králové. La Klubo aranĝis la 2. Dec. Nikolaan vesperon kun ĉeĥo-esp. programo kaj la 12. Dec. Zamenhofan vesperon. — Tutpaĝa informa artikolo pri esp-o estis metita en la flugfolion disdonatan al la publiko de la Radio-klubo loka, okaze de la propaganda radio-dimanĉo.

Praha. Esperantista Klubo kunvenas ĉiuvendrede en speciala ĉambro de kafejo Edison (II. et.) Prikopy 1. Regula ĉeesto de 50-60 personoj. El la programo de la kunvenoj ni citas. La 6./XI. S-ro *Nagy Csaba* parolis pri spiritalaj movadoj, S-ro *Echtner* recitis esp. tradukon de la poemo de *Schiller*: La grupoj de Ibkuso. — La 13./XI. Inĝ. *Molnár* pri elementoj de radio-telefonio kun koncerto per sia radioaparato. — La 27./XI. S-ro *Riedl* parolis pri esp-a poezio kaj S-ro *Echtner* recitis liajn poemojn.

MORTIS

La 28. de novembro mortis en Olomouc s-ro *Eugen Fierlinger*, Profesoro en p. 77. jara, de ambaŭ nacioj tre estimata. Antaŭ sia pensiumiĝo li instruis kiel lingvisto en la ĉi tiea germana reala lernejo. Unu el liaj filoj estas ĉefkonsiliisto en ministerio de publikaj laboroj, la alia ĉsl. ambasadoro en Washingtono. La mortinto gvidis la unuan esperanto-kurson en la urbo en la jaro 1908 kaj estas fondinto de esperanta movado en Olomouc. Li ĉeestis ankaŭ la 3. Universalan kongreson de Esperanto en Cambridge en 1907. La ĉi tiea esper. societo honoros lian daŭran memoron per bela esperanta libro en vicigota en publika librejo, esperantofako. Ripozu pace, kara amiko.

EL NIA LETERUJO

Estimata redaktoro!

Pasintsomere mi kun mia edzino vizitis kaj traveturadis Finnlandon, por ĝui kaj admiri ties vidindaĵojn, naturbelecojn, la meznoktan sunon, k. t. p. Spite, ke mi scipovas nur kelkajn vortojn finnlingve, mi — dank' al Esperanto — ĉiuloke tre bone interkompreniĝis, ja miaj finnaj samideanoj gastigis nin kaj superŝutis nin tiel malavare per tiom da signoj de afableco kaj komplezemo, ke mi ne povas sufiĉe danki ilin.

Sed mia vojaĝo rezultigis eĉ aliajn konsiderindajn sukcesojn.

Nome: La loĝantaro de la nordfinnlanda urbo Kemi surprizite admirante la utilon de Esperanto are partoprenis la novekomencintan kurson, speciale sub influo de mia ĉeesto, respektive la povo de mia reciproka interkompreniĝo kun tute alilingvuloj!

Por almenaŭ iomete rekompenci la nepriskribeblajn servojn de miaj finnaj amikoj, mi nun aranĝis finnan vesperon kaj ekspozicion de finnaj manlaboroj, fotografaj, gazetoj k. t. p. en la najbara urbo Prešov kun kantado kaj muzikprezentado de finnaj naciaj kantoj — kaj kun parolado, pritraktanta miajn dumvojaĝajn spertojn, travivaĵojn kaj la nekompareblan utilon de Esperanto. La festo brile sukcesis, ĉeestis 400 (ne troigo!) personoj, inter ili kiel bonvenintaj gastoj: Sinjoro *Yrjö Soini*, finlanda konsulo en Praha kaj la finna Sinjorino *Aino Hjelt*.

La aranĝintaro de la finna vespero ricevis saluttelegramon de la esperanta grupo „La norda lumo“ en Kemi (Finnlando), kaj salutleteron de la ĉeĥoslovaka konsulo en Helsinko.

La loka gazetaro raportas pri la vespero, kiel la plej signifa kaj plej grava okazintaĵo en nia regiono.

MUDr. V. Austerlitz (*Bardiov*).

Ekspozicioj. Oni legas kaj aŭdas en gazetoj ke diversaj provincaj fakaj aŭ aliaj ekspozicioj estas aranĝataj. Sed pri esperanto oni nenie aŭdas (escepte *Žamberk*). Mi ĉeestis la teritorian ekspozicion en Turnov, sed vane mi serĉis ion „verdan“ pri lingvo aŭ en ĝi. Tiaj ekspozicioj okazos ankaŭ en 1926 en pluraj lokoj de la respubliko, ĉu ne estus inde ion entrepreni? Ĉu lokaj grupoj ne povus zorgi pri tio?

ISano.

Sekcio estas varbi anojn por la Internacia Scienca Asocio ĉe la ne-esperantistaj fakuloj. — La sekcio informis pri tiu ĉi sia agado la Naciajn Societojn Esp. de 14 landoj kun peto pri kunlaborado. El ili ĝis nun respondis sole la Dana kaj Hungara. Oni atendas la respondon de la Belga, Brazila, Bulgara, Estona, Finna, Kataluna, Litova, Norvega, Samosa, Sudslava, Latva (Riga), Pola. La sekcio bezonante por siaj multaj gravaj taskoj kunlaborantojn, petas ĉiujn ĉs. interesantojn anonci sin al Dro Stan. Kamaryt en Bratislava (Telocvičná, 3), kiu estas komisiita gvidi la laboron de la Sekcio.



ALVOKO POR LA XIIAJ INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ 1926.

„Kataluna Esperantisto“ publikigis la unuan serion de premioj kaj kondiĉojn por partopreno en la jaraj Floraj Ludoj 1926. Jen resumo:

Ekzistas 4 ordinaraj temoj: originala verkajo kantanta amon, originala ama verko en prozo, du tradukoj en la kataluna lingvo. Plie ekzistas eksterordinaraj konkursoj kun temo laŭvola aŭ difinita.

La verkoj prezentotaj devas esti verkitaj en Esperanto kaj ne ankoraŭ eldonitaj aŭ anoncigitaj.

La manuskriptoj, kiuj portos surskribitan devizon, devas esti ricevitaj antaŭ la 15. februaro 1926 ĉe la Sekretario de la Floraj Ludoj (S-ro. Josep Ventura, Carrer Creu, 75-Terrassa, Katalunujo) akompanataj de fermita koverto, kiu surhavas la saman devizon kaj entenos la nomon kaj adreson de la verkinto.

La laŭreato de la Ama verko ricevos la kutiman naturan floron kaj rajtos elekti la Reĝinon de la Festo okazonta en Santa Coloma, en Majo.

La aŭtoroj de la 4 premiitaj ordinaraj temoj ricevos luksan ekzempleron de la verko „Kataluna Antologio“. Krome oni donos atestatan diplomon al ĉiu laŭreato.

La premioj de la eksterordinaraj temoj estas sumoj de 25 ĝis 100 pesetoj (120—480 Kĉ).

La manuskriptoj ne estos resendataj. La listo de la premiitoj aperos en „Kataluna Esperantisto“ kaj en aliaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represi. — Ĉiujn detalojn pri la Floraj Ludoj publikigas la gazeto „Kataluna Esperantisto“, kies jarabono kostas 6 sv.fr. aŭ 1.50 usonajn dolarojn aŭ egalvaloron efektivegeblan en Barcelona, ĝia adreso estas en Barcelona, carrer Valencia, 245.



LA XXIV. INTERNACIA KONGRESO POR LA PACO, FAVORA AL ESPERANTO.

Sinjoro Ladislav Staněk, profesoro ĉe ŝtata reformita reala gimnazio en Brno-Královo Pole kaj membro de la Esperanta sekcio en la Centra Asocio de ĉeĥoslovakaj profesoroj en Praha, ĉeestis la 24an pacifistan internacian kongreson okazantan la 1-an — 6an de septembro 1925 en Parizo kaj proponis, ke Esperanto estu akceptata kiel unu el oficialaj lingvoj de la kongresoj. En la propaganda komisiono estis poste voĉdonita sekvanta rezolucio:

„En nomo de la Esperanta Sekcio de profesoroj de mezaj lernejoj ĉeĥoslovakaj en Praha kaj de la Esperantista klubo en Brno, kaj samtempe en la nomo de Franca societo kaj de la Pariza grupo por la propagando de l' Esperanto

la kongreso esprimas sin favora al internacia helpa lingvo Esperanto kaj instigas la edukistojn de lernejoj ĉiagradaĵe ke ili klopodu, ke oni instruu en ĉi tiu helpa lingvo iliajn lernantojn komencante se eble jam en juna aĝo.“

Ni sincere dankas kaj gratulas al sinjoro profesoro Staněk pro ĉi tiu sukceso, kiun li atingis kiel oficiala delegito de Mirová Jednota (Paca Unio) en Brno.

R. F.



(La XVIII. kongreso en Edinburgh) estos certe celo ankaŭ de pluraj el niaj legantoj. Multajn fortimigas la alteco de vivado en Anglio. Sed oni atentigis nia jam en Genevo, ke en Skotlando la prezosituacio estas ĝenerale pli favora ol en Anglio kaj precipe en Londono. Bremaĵ esperantistoj informas en sia cirkulero pri antaŭkongreso en Bremen, 27—29 Julio ke ili faris kontrakton kun Norddeutscher Lloyd. laŭ kiu la vojaĝo el Bremen al Bremerhaven (kaj reen), la ŝipveturo de tie al Leith (40 horoj) kaj reen, la 8 taga restado en Edinburgh, kun kompleta pensio kostos

triagrada	250 M (2.000 Kĉ),	500 personoj
duagrada	300 M (2.400 Kĉ),	317 personoj
unuagrada	350 M (2.800 Kĉ),	143 personoj

Kondiĉo estas aliĝi kaj pagi antaŭ la 1. Aprilo almenaŭ $\frac{1}{3}$ de la sumo. La prezoj validas, se la ŝipo estos plene kupita. Ankaŭ neesperantistoj povas partopreni, se ne sufiĉe da esp-istoj aliĝos. La kofizo antaŭkongresa estas 3 M (24 Kĉ), kun la unua pago oni devas sendi 10 M (80 Kĉ) por t. n. deficiĉkonto. Neuzita mono estos repagita.

En la cirkulero ni legas, ke en okazo, ke tiu ĉi karavano ne efektiviĝos, la kongresanoj devos pag por la vojaĝo Bremen, Southampton, London, Edinburg kaj reen minimume 300 M (2.400 Kĉ), sen pensio, kaj en Ed. la pensio por la kongressemajno kostas minimume 165 M (1.300 Kĉ). Informojn donas: MUDr. C. Renken, Bremen, Häfen 26, monon sendu al H. Keller, Bremen, Gösselstr. 77.

Vojaĝo el Praha al Bremen kostas, laŭ informo de la Vojaĝa Oficejo Ĉedok 290 Kĉ (3. klaso rapid.) Forveturante el Praha je 14:28, tra Dresden, Hannover, oni atingas Bremen je la 7 matene.

(Terura cirkulero) estis al ni sendita de Loka Komitato de Franca kongreso en Strassbourg, kun peto rekomendi glumarkojn por kovri la kongresan deficiton 1000 fr. En 11 linioj 14 gramatikaj eraroj. Ĉu en Strassbourg ne troviĝas samideano, kiu estas povinta helpi ĉe redaktado de tiu oficiala letero?

TRA LA GAZETARO.

Amerika Esperantisto (Dec., 1925) en artikolo *La esprimovoj de esperanto*, de nekonata aŭtoro, pledas por tio ke oni pli accentu la leksikonojn nur-esperantajn, ĉar la ĝisnunaj naci-esperantaj, vortaroj per sia negranda amplekso ne povas konkuri kun riĉegaj vortaroj naciaj. Li kontraŭbatalas la deziron de tiuj kiuj dirante ke ankaŭ poezio, kiel ĉiu fako de homa kulturo, devus havi sian teknikan esprimaron, volus havi la poezian lingvon pli riĉa. Laŭ li, la poezio ensence apartenas al lingvoj hejmaj, esperanto poetojn ne bezonas, ĝi estas lingvo de *pensoj*, ne de *sentoj*. La ĝisnuna literaturo montris, ke esperanto havas plenplenegajn rimedojn por esprimi la pensojn kaj ke tiu ĉi materialo (ne simple radikoj, sed vortoj kaj esprimoj devus esti disponigitaj al la tutmonda esp-istaro en la formo de vortarego nur-esperanta.

Ĉu la proza literaturo, kiun la aŭtoro nur permesas, esprimas ĉiam nur la pensojn, neniam la sentojn? Kial do malpermesi, ke iu esprimu la sentojn en formo rima kaj ritma, poema? Ĉu la aŭtoro konas la brilan argumentadon de Dro Privat en lia verko pri esp-o kaj literaturo? Kial tia militiro kontraŭ pliriĉigo de *faka* lingvo poezia, kies esprimojn ne bezonas ja lerni tiuj, kiujn la poezio ne interesas, same kiel ne ĉiu el ni scias esp-ajn esprimojn el ĉiuj aliaj fakoj (maŝinfako, medicino ktp)?

La cetera enhavo de la gazeto estas angla, krom kelkaj ekzercoj kaj anekdotoj.

Aŭstria Esperantisto (Jan., 1926) raportas pri dekreto de la ĝenerala direktoro de aŭstria fervojoj, kiu instigis la tutan fervojistaron al lernado de esp-o kaj permesis portadon de la insigno dum deĵoro. Sekve de tio, ĉe la direkto Wien-Ost okazas 6 kursoj por 240 fervojistoj. En la tuta lando, laŭ la enketo farita somere, 1100 fervojistoj ĉiurangaj el 100 lokoj esprimis deziron lerni esp-on. — En la konferenco de Aŭstria Esperanto-Delegitaro en Wien 10. Jan. estis konstatita la kresko de la afero en la tuta respubliko. — La arbitracia komitato por esplori la aferon Schade ankoraŭ ne finis sian laboron, sed plej baldaŭ raportos pri ĝi.

Esperanto, N-ro 1. (Jan., 1926): *Kiel funkcias nia organizo* (D-ro Privat): „Sen la nuna organizo la komitato de UEA estus sola por... gvidi la internacian centron. Oni opiniis, ke estas pli taŭge, ke ankaŭ la naciaj societoj sentu sin kune respondaj pri tiuj internacie komunaj aferoj kaj tio estas la tuta esenco kaj la sola signifo de Internacia Centra Komitato. — Oni neniam intencis krei du internaciajn organizojn por la samaj celoj, unuflanke UEA kaj aliflanke K. R. Oni volis, ke la du ekzistantaj flankoj de nia movado UEA kaj la Naciaj Societoj havu praktikan rimedon por regule kunlabori. K. R. estas laŭ sia nomo mem aro de reprezentantoj de la Naciaj Societoj, delegitaj por diskuti kun UEA kaj elekti kune la internacian C. K. Al tiu C. K. la naciaj societoj kaj UEA komisiis certajn taskojn.

Fervojisto, 4-5. (Nov.-Dec., 1925.) Bona riĉa gazeto, kun fakaj artikoloj. Tre interesa estas la Fervoja terminaro, redaktata de Ing. E. M. Rosher en San Francisco.¹⁾ F-ino S. *Dlouhá*, Praha, publikigas tie trad. de rakonto: Dum paŭzo, de M. Laderer, plie alvokon, ke ŝi estas preta aranĝi kur-

¹⁾ Kteři z čs. železničářů jsou ochotni zkoumati navrhované zde termíny z našeho stanoviska a obstarávají jejich české překlady? Byla by to práce elmi záslužná a užitečná. Pište nám. Red.

son por komencantoj aŭ por progresintoj en la urbo, kie mankas instruisto kaj kie estas bona fervoja komunikado. Adreso: S. *Dlouhá*, Praha, Wilsonovo nádraží, pokladna č. 1.

Nova Sento, tre interesa organo de Kiusyu Esperantista Ligo en Fukuoka, Japanujo. En la N-ro 4. (Sept.) en la artikolo: *Mirinda eco de esperanto*, ni legas la jenajn interesajn informojn: Japanoj havas strangan psikan inklino adori kaj blinde respekti fremdpopolan kulturon. Post kiam niaj prapatroj alprenis hinajn literojn ni ne povas liberigi de la maloportuneco, kiun alportas al nia ĉiutaga vivo ilia malsimpleco kaj malfacileco. Spite tio, multe da kleruloj ekzistas, kiuj konsideras la hinajn literojn necesaj por konstrui orientnecian karakteron. Aliaj fanfarone opinias, ke nia estonta lingvo estu la angla, al ili nia gepatra lingvo estas nekara kaj forĵetinda. Tamen Japanoj havas tre simplan fonetikan literaron konvenan por la japana lingvo, konsistantan el ĉirkaŭ 50 signoj, kiujn oni nomas *Kana*. Ĉiu litero de *Kana* prezentas sonon vokalan, aŭ kunmetitan kun vokalo kaj konsonanto. Oni povas per ĝi skribi vorton multe pli facile ol per la romana alfabeto, ekz. por vorto esperanto oni bezonas naŭ, sed per *Kana* nur ses literojn. Sed tiu ĉi *Kana* estas instruata al lernantoj en la unua jaro nur kiel ilo por koni hinajn literojn. Kioman grandan ekonomion alportus al ni, se ni nur uzus *Kana*. — La angla lingvo kaj hinaj literoj tre imponas al niaj kleruloj kaj studentoj.“

Legante tion ĉi ni devas admiri la diligentan laboron kaj notindajn sukcesojn de la japanaj samideanoj. Ŝajnas al ni, ke same kiel inter malgrandaj nacioj de Eŭropo, ankaŭ por klarvidaj Japanoj esperanto prezentas liberigon el jugo de fremdlingveco, kiu estas tiom temporaba por iliaj lernantoj.

En la N-ro 5, (Okt. 1925) ni eĉ legas tiun ĉi kuriozajn: En Oktobro 1925 okazas en Tokio medicina konferenco de medicinistoj el ĉiuj nacioj apud Paca kaj Hinda Oceano. Ĉe tiu okazo japanaj medicinistoj plejparte intencas uzi la anglan lingvon, kaj panike eklernis ĝin. Sed ĉu ili povos libere klarigi, kion ili volas diri? Ĉu la ĉeestontoj povos kompreni, kion la parolantoj parolos? Estas hontinde, ke neniu faros paroladon japane, malgraŭ ke du trionoj de la ĉeestontoj estas japanaj kaj la konferenco okazos en Tokio. Nur du eminentaj kuracistoj Dro Ogata kaj Murata faros la paroladojn en esp-o.“

Kurioza, ĉu ne? Sed en kia lingvo parolas eĉ niaj plej grandaj patriotoj (kaj ofte samtempe kontraŭuloj de esperanto) dum internaciaj kunvenoj en Praha, kie kompreneble la plejmulto estas Ĉeĥoj? Rakontigu al vi, kiel aspektas ekz. fakaj konferencoj de delegitoj de mezeŭropaj ŝtatoj. La partoprenantoj scias eĉ fremdan lingvon, sed kiom helpas se ekz. Ĉeĥa delegito scias la germanan kaj la Rumana delegito sole la francan? Kaj tamen ĉiu el ili en kelkaj monatoj ellernus la simplan esperanton kaj dum tia konferenco aŭ kongreso facile, klare kaj rapide ili povus trakti, neĝenataj per lingvaj malfacilaĵoj. De tie ĉi venos venko de esperanto, de tiuj ĉi popoloj, kies lingvo neniam fariĝos tutmonde konata kaj kies anoj ĉe ĉiu sia paŝo ekster la landlimojn kaj eĉ dum ĉiu sia reciproka rilato devas paroli fremdan lingvon. Sed se almenaŭ estus nur unu tia lingvo! Sed se vi volas esti plene kapabla, vi devas scii tri, ĉar alie okazos al vi, ke vi estras ĝuste tiun, kiun la alia persono ne scias, kaj la Babilono daŭras...

LABORISTA LIGO ESPERANTISTA

Ĝia oficiala raporto.

OKCIDENTBOHEMA REGIONA KUNVENO

Ĝi okazis dimanĉe, la 13. Decembro 1925 en *Plzeň*, granda halo de laborista Domo, kiu estis plene de samideanoj kaj gastoj. La kunveno, malfermita de S-ro Jos. *Pech*, honora prezidanto de LLE, elektis kiel prez. S-ron Jos. *Pešek*, vicprez. S-ron Ing. Rud. *Novák*, kaj komitatanojn S-ro *Příbáň* kaj *Štädler*. Post kanto de la Espero, Sro *Štädler* legis la protokolon de la lasta kunveno en Domažlice. Post lego de diversaj salutleteroj sekvis salutvortoj de multaj delegitoj, ĵurnalistoj ktp. — Poste S-ro J. *Gross* parolis pri esperanto, kio entuziasmigis la ĉeestantojn. En granda debato, kiun partoprenis multaj delegitoj, estis decidite disvastigi esperanton kiel eble plej multe kaj peti ĵurnalistojn pri subteno de tiu ĉi grava tasko. Post klarigo de multaj punktoj de S-ro *Pešek* kaj post memorigo pri nia Majstro la sukcesplena kunveno estis fermita.

Granda vesperamuzo kun ĉeĥo-esp-a programo okazis la sabatan antaŭvesperon, en sama ejo. Krom ĉeĥa teatraĵo estis prezentita „Nova Sporto“ de *Lukáš* kaj propaganda teatraĵo de *Pešek* „En esperanta familio“, kiuj estis kun granda entuziasmo aplauditaj.

LABORISTA LIGO ESPERANTISTA centro Plzeň, Peklo.

La sekcioj aranĝu siajn ĝeneralajn kunvenojn laŭeble ĝis 15 Februaro, kaj nomu delegitojn por la ĝenerala kunveno de LLE okazonta la 7 Marto en *Plzeň*.

La societo *Plzeň I.* festos en Junio 15-jaran jubileon de sia ekzisto, pro tio estas necese, ke ĉiuj membroj de LLE partoprenu tiujn tagojn. Samtempe okazos granda esperanto-ekspozicio en burĝa lernejo.

LLE volas rilati kun ĉiuj ĉs. esperantistoj laboristoj; tial ĝi petas, ke ili anoncu al ĝi sian adresojn. Ni ŝatos rilati ankaŭ kun eksterlandaj societoj laboristaj. Al siaj membroj LLE rekomendas abonon *La Progreso*.

LABORISTA SOCIETO PLZEŇ I.

Ĝenerala kunveno okazis la 13. Januaro en *Peklo*. Ĉeestis 90 p. Sekretaria raporto de S-ro *Pešek* estis tre interesa kaj atestis pri granda kaj sukcesplena laboro. Sekvis raportoj de aliaj funkciuloj. — La societo kun granda monofero akiris novan ejon, kie la membroj kunvenadas 4foje en la semajno, kie oni aranĝas kursojn, konversaciojn, vesperetojn. Ĝi estas bele ornamita per portretoj de eminentaj personoj kaj per esp-ajoj. — La societo aranĝis 4 kursojn por komencantoj kaj 1 kurson por progresintoj, kiu daŭras. Nova komitato: Prez. kamarado *Pech* Jos., vicprez. J. *Hrabák*; sekr. J. *Ježek*; kas. J. *Pešek*; protokol. V. *Brož*; bibl. J. *Prokop*; arkiv. *Fleišhans* O.; komitatanoj: *Erhard* Fr., *Valeš* J., *Sleisová* A., *Malý* J. Revizoroj: *Holubová* M. kaj *Fara* Fr. La komitato konstituiĝis en sia unua kunveno la 20 Jan.

V. ECHTNER :

PRI ESPERANTA STENOGRAFIO*)

Kio estas stenografio? — Tiu ĉi demando ne plu estas aktuala. La ideo eltrovi rimedon, kiu ebligis skribi tiel rapide, kiel oni parolas, datas jam el la tempo, kiam oni komencis uzadi la plej primitivan skribmanieron. Kaj hodiaŭ la stenografio estas propraĵo de ĉiu inteligentulo. Precipe en la dua duono de la pasinta jarcento, kiam Majstro *Gabelsberger* solvis la rapidskriban problemon per kreo de stenografa sistemo, kiu prezentas la modernan skolon de stenografa sistemo, kaj laŭ kiu oni stenografas la plej multajn lingvojn kaj kreas la sistemojn novajn, tiu ĉi arto disvastiĝis tre rapide. Ne ekzistas lingvo de kulturita nacio sen stenografio. Ankaŭ Esperanto havas jam nuntempe ampleksan literaturon stenografian.

Inter la fruaj adeptoj de Esperanto sendube estis ankaŭ lertaj kaj fervoraj stenografistoj. Baldaŭ aperis ĉe ili la ideo, alkonformigi al Esperanto la sistemon, kiun ili uzadis por sia gepatra lingvo, duni al la skribo formon kaj regulojn, kiuj ebligis facilan kaj rapidan stenografadon de Esperanto. Tiel ekestis la unuaj Esperantaj Stenografioj.

La unuaj signoj de tiu ĉi movado aperis kredeble post la *Bulonja* Kongreso. En la jaro 1907 aperis en la eldonejo *Heckners Verlag* en *Wolfenbüttel* la unua lernolibro de „*Natura Stenografio Gabelsberger* aliarita al Esperanto de G. *Christoffel*“. La libro enhavas bonege ellaboritan stenografan sistemon, kiu ebligas facile stenografi eĉ la plej rapidan parolon Esperantan. — La dua lernolibro, same alfaro de *Gabelsberger*'a sistemo al Esperanto, verkita de *Dro A. Schramm*, kaj aperinta en jaro 1910 en la sama eldonejo prezentas neplenan solvon de la problemo, havante fundamentajn mankojn kaj neniamajn regulojn aŭ nur konsilon pri la ĉefa faktoro de stenografado — la mallongigado. Tamen la dua sistemalfaro trovis pli da adeptoj, kiuj fondis eble en la jaro 1911 la *Internacian Stenografian Ligon* „*Gabelsberger*“, kiu havis eĉ sian propran organon „*Gabelsberger*“ kun aldono de stenografitaj tekstoj en Esperanto. Sed kredeble la milito baldaŭ malhelpis la plenan disvolvon de tiu ĉi institucio. — Interesa estas la laboro de *Rudolf Sprotte*. La aŭtoro trovis tre ĝuste, ke ne estas facile stenografi diversajn lingvojn laŭ diversaj sistemoj, kaj ke precipe la Esperantaj Stenografistoj tre ofte estas devigataj stenografi almenaŭ du lingvojn. Tio montras, ke *Sprotte* okupiĝis pri la problemo tre serioze. Lia libreto kun titoto: „*AORO, Stenografio Internacia*“ alportas sur nur 31 paĝoj plenan instruon de tiu ĉi sistemo por la lingvoj Esperanta, Angla, Franca, Germana, Rusa, kaj Hispana. Alia originala sistemo Esperanta estas la „*Stenografio por Esperantistoj*“, kiu nun aperas ĉe *B. P. Roubos* en *Dordrecht*, *Nederland*; specimenan ekzempleron de lia pokajera eldonaĵo povas ricevi ĉiu interesulo senpage.

Aliaj alfaroj plej konataj estas: en la Angla: *Pittmann-Buttler* kaj kelkaj amikoj, „*Espersteno*“ de *Pittmann-Catton*; el la Franca: *Duployé-Flageul*;

*) Ni rekomeadas tiun ĉi interesan artikolon al speciala atento de ĉs. samideanoj. Kun la disvolvo de nia movado, la bezono de lertaj esperanto-stenografoj ĉiam pli estas sentata. Kontentigi ĝin estas tre facile precipe por tiu, kiu jam scias stenografi nacilingve.

Red.

el la Germana : Stolze-Schrey, Gabelsberger-Jakob ; en la Itala Meschini-Russo, k. m. a.

La originalaj sistemoj Esperantaj ne havas kaj verŝajne ne havos multan uzon ; precipe ne dum tiu tempo, kiam ili ne estos alfaritaj al naciaj lingvoj, kion kredeble la multaj bonegaj sistemoj naciaj ne permesos. Ĝenerale niaj modernaj stenografistoj precipe la nialandaj kaj Esperantaj, praktike stenografas almenaŭ du lingvojn. Estas granda avantaĝo, ke oni povas uzi por tia stenografado de pli da lingvoj sole unu sistemon. Sed la sistemo de Gabelsberger havis siajn 33 alfarojn (nun 40) al la plej diversaj lingvoj longe antaŭ „Aoro“ de Sprötte. Tial „Aoro“ ne trovis grandan akcepton. Pro la cititaj kaŭzoj ankaŭ la Internacia Asocio de la Esperantistoj-Stenografistoj rekomendas uzi por stenografi Esperanton la sistemon, (resp. ĝian alfaron), kiun oni praktikas por sia nacia lingvo. Tamen la Asocio same zorgas pri la originalaj sistemoj, sciante pri ilia valoro por la evoluo de Esperanto kiel moderna lingvo. — La asocio posedas sian propran organon „Internacia Stenografisto“, kiu, aperante kvankam nur dumonate kaj poligrafita, tamen alportas tre interesajn artikolojn kaj komunikaĵojn de temo stenografia kaj ŝajnas esti neevitebla por la movado.

La uzo de Esperanta Stenografio en kiu ajn formo estas jam granda, sed pli granda estas la bezono. Tial la du lastaj fakaj konferencoj, la Komercista kaj Scienca, voĉdonis rezolucion, kiu alvokas la Esperantajn societon instigi siajn membrojn al lernado de Esperanta Stenografio. En kelkaj ŝtatoj estas aranĝataj konforme al tio kursoj, kaj lernolibroj estas vendataj. Ja sen stenografio ne estas pensebla laboro dum niaj konferencoj kaj kongresoj, en redakcejoj kaj oficejoj. Nia movado prezentas jam kelkajn lertajn stenografistojn, sed iliajn vicojn pliigi estu la zorgo de niaj societoj kaj la intereso de opaj samideanoj.*

* Detalajn informojn petu de V. Echnert, Praha VII, Sochařská 335.

REDAKCIA INFORMO

— Sekve de la alia riĉa materialo ni ne povis publikigi ĉiujn rubrikojn, kaj tial mankas la Bibliografio kaj la Lingva Fako kiuj ricevos sian lokon en la venonta numero.

— Personojn, kiuj akceptis la unuan numeron ni opinias abonantojn, kaj sendados al ili la gazeton. Ni petas ilin sendi la abonon plej baldaŭ por ŝpari al ni la temporaban laboron de admonado. Al tiuj, kiuj jam sendis sian abonon ni tre kore dankas. Ili montriĝis veraj amikoj de nia gazeto kaj ni esperas, ke ilia nombro kreskos post apero de tiu ĉi numero.

Esp. preklad z *estonštino* :

Fr. Tuglas :

KVIN NOVELOJ

Trad. H. Seppik

176 str. Kĉ 20— u Progresu.

Z ESPERANTSKÉHO SVĚTA

III. kongres československých esperantistů se seje letošního roku v Bratislavě ve dnech 1. a 2. května. Svaz československých esperantistů se usnesl k žádosti bratislavských esperantistů svolatí sjezd do východní části republiky, aby se tamní delegáti seznámili s pracovníky Čech, Moravy a Slezska a měli příležitost projednatí se zástupci ústředí různé důležité otázky týkající se práce pro esperanto na Slovensku a v Podkarpatské Rusi. Protektorát sjezdu převzala městská rada bratislavská, která též zapůjčila ke schůzím sjezdovým krásný zrcadlo-vý sál v radničním paláci.

RUR přeloženo do esperanta. Čapkovu drama RUR přeložilo se zvláštním svolením autora a svým nákladem vydalo olomoucké sdružení esperantistů Moravští průkopníci. Drama je přeloženo velmi výstižně, krátké úvodní slovo o Čapkově a jeho dramatech napsal Otto F. Babler. Překlad tento setkal se v zahraniční veřejnosti esperantské se značným zájmem, zejména v zemích, do jejichž jazyka dosud dílo přeloženo nebylo.

XVIII. světový kongres esperantský bude se konatí v Edinburgu od 31. července do 7. srpna. Očekávána jest účast delegátů z mnoha zemí, dosud došlo několik set přihlášek. Věhlasní odborníci různých národů budou tam konatí své přednášky. O zábavu účastníků bude také dostatečně postaráno. Uspořádán bude skvělý mezinárodní ples, kde se objeví mnozí z účastníků ve svých národních krojích a proponován jest též celodenní výlet ke krásným jezerům řeky Clyde.

Zná Vaše okolí zprávy zde uveřejňované ?

Esperanto povinným předmětem na školách. Člen městské rady bratislavské Masar podal v nedávné schůzi obecního zastupitelstva návrh, aby na městské dívčí škole v Bratislavě bylo vyučováno povinně esperantu. Návrh byl přikázán příslušné komisi a jí schválen.

Klub dělnických turistů v Praze pro esperanto. Klub dělnických turistů, seznav výhody společného jazyka pro turistiku, usnesl se pracovatí k rozšíření esperanta mezi svými členy. Doporučil jim učení tomuto jazyku a ve svém časopise zřídil zvláštní esperantskou rubriku. Časopis přináší často též zajímavé překlady z esperanta.

Japonská Akademie věd o esperantu. Letošní zimy jednala japonská Akademie věd o problému mezinárodního jazyka. Otázku, zda jest mezinárodního jazyka třeba, zodpověděli všichni členové Akademie, počtem 43, kladně. Na druhý dotaz, který jazyk nutno zvolití k tomu účelu, vyslovili se 24 členové pro esperanto, 18 se zdrželo hlasování a 1 doporučoval jiný jazyk. Akademie věd v Tokiu má mezi svými členy tři činné esperantisty, barona Hozumi, zoologa Oku a meteorologa Nakamuru.

Finská vláda pro esperanto. Jako pravidelně každého roku, obdržel též letos Finský svaz esperantský od tamního ministerstva vyučování podporu, které použije letošního roku především pro venkovské učitele, aby jim umožnil účast na esperantském

kursu, který bude uspořádán v Helsinkách pro učitele obecných škol. Finské ministerstvo vyučování rozeslalo na různá místa, zvláště všem školním inspektorům, spis Světový pomocný jazyk z filologova hlediska, sepsaný slavným jazykozpytce prof. Setälä, nynějším ministrem věcí zahraničních. Ministerstvo si vyžádalo od těchto osob posudky o možnosti vyučování esperantu jakožto druhému jazyku v obecných školách finských.

Nákladní listy s esperantským tiskem. Pařížská obchodní komora se usnesla vydati námořní nákladní listy (konosementy) s francouzským a esperantským textem. Tato komora již užívá esperantských „Osvědčení o původu,“ která jsou nutná při zásilkách do některých zemí.

Esperanto na rakouských drahách. Správa rakouských drah vyzvala své zaměstnance k učení esperantu a slíbila jim k tomu veškerou podporu. Zároveň povolila nošení esperantských odznaků i ve službě.

Oficiální instituce australská pro esperanto. Druhá výroční schůze Australského ústavu pro bezdrátovou telefonii, konaná v Perthu, usnesla se přimoci esperanto k mezinárodním stykům. Radioamatérský týdeník Wireless Weekly v Sidney zavedl nyní pravidelnou esperantskou rubriku a zvláštní odbor, v němž radí svým čtenářům zajímavým se o esperanto.

Jest v zájmu věci, aby tyto zprávy četli neesperantisté!

Japonští letci s esperantským poselstvím. Letecká výprava z Tokia do Moskvy přinesla s sebou poselství japonského listu Osaka Asahi. Dopis byl napsán esperantem a obsahoval pozdravy ruskému národu. Vzkaz Japonců pravil též: Osaka Asahi uznává velkou důležitost čtyř hlavních prostředků k sblížení národů — aviatiky, radia, esperanta a kinematografu a pomáhá všemi způsoby k jejich rozšíření a vzrůstu. List upozornil na svou stálou esperantskou rubriku a navrhoval výměnu filmů a radiový styk pomocí esperanta.

Přednášková cesta Japonce po Evropě. Japonec Koogecu Nišimura, vyslaný loňského roku ústředím asijského náboženského hnutí Oomoto do Evropy, aby zde propagoval zásady tohoto hnutí, odjíždí do Španělska, kde bude konati v mnoha městech esperantské přednášky. Zároveň obdržel pozvání z Estonska a též z několika míst československých, takže jest naděje, že i zde uslyšíme tohoto výborného řečníka. Příznačná jest velká pile tohoto Japonce. Ač jest stále zaměstnán přednáškami, založil a řídí v Paříži evropskou kancelář hnutí Oomoto a vydává tam propagační časopis, psaný esperantem.

Pokroky esperanta v Korei. Mezi Korejci jsou to zvláště učitelé a studenti, kteří se učí esperantu a pracují k jeho šíření, ježto jej považují za účinný prostředek k povznesení svého porobeného národa. Korejští esperantisté vydávají v Seulu svůj vlastní časopis, který jest psán esperantem a japonsky, nikoliv v korejském jazyku, neboť všechna vyšší výchova v zemi děje se v japonštině. V prvních číslech píše, jak se počalo esperanto šířiti na Korejském poloostrově; zmiňuje se o korejských lístech, které z národních důvodů rády esperanto pod-

porují a o upřímné podpoře vzdělaných Japonců usidlených v této zemi.

Vyučování esperantu v Německu — radiem. Velké německé radiostanice, které minulého roku vesměs s velkým úspěchem vysílaly esperantské kursy, pokračují nyní k žádosti svých abonentů v těchto denních rozhlasích. Berlínská vysílací stanice Voxhaus vydala pro své předplatitele esperantskou učebnici, jejíž celý náklad o 4000 výtiscích byl za dva týdny vyprodán. Na konverzační cvičení ohlášená touto stanicí se přihlásilo 518 žáků, takže bylo nutno zahájit mnoho souběžných kursů.

Esperanto v Rusku. Ve všech částech sovětského Ruska jest slyšeti nyní o esperantu. Jsou konány veřejné přednášky, v dělnických a vojenských klubech a velký počet časopisů mluví pro všeobecné užívání esperanta jakožto jediného společného jazyka k styku se zahraničím. Komisař vyučování Lunačarskij vyslovil rovněž své sympatie k esperantu a zástupce komisare pošt a telegrafů Lucovič sám esperanto dokonale ovládá. Z moskevské radiostanice promluvil nedávno esperantskou přednáškou. Radiofonický odbor rady odborových svazů v moskevské gubernii prohlásil, že jeho styk s cizinou se bude dít jen esperantem.

Esperantské desky gramofonové vyrobila londýnská společnost Linguaphone, jež požádala přední esperantské řečníky, aby dali zachytiti své řeči. Desky budou nyní rozeslány jakožto vzor esperantské výslovnosti zvláště do vzdálených krajů, kde jest esperanto ovládáno jen jednotlivci majícími málo příležitosti k zdokonalování. Celý kurs esperanta na gramofonových deskách stojí asi 8 anglických liber.

Nepostrádatelnými příručkami pro každého českoslov. esperantistu

jsou nová methodická díla

Julie Šupichové

ESPERANTO.

Nejoblíbenější a nejužívanější česká učebnice, výbor článků a slovník esperantsko-český. — Druhé, přepracované vydání.

Cena pouze Kč 9.60.

Kniha česko-esperantské konveršace.

Libro de ĉeĥa-esperanta konversacio.

Cena pouze Kč 9.60.

LEĜU KAJ PAROLU!

Esperanta legolibro. Kč 15.—.

Lze obdržeti v každém řádném knihkupectví neb přímo u nakladatel.

Š O L C A Š I M Á Č E K

spol. s r. o. PRAHA-II. Jerusalemská 11.

Právě vyšlo:

Karel Čapek:

R. U. R.

(Rossum-Universal-Robotoj)
109 str. Cena 13 Kč.

Julie Šupichová:

Kniha konverzace česko-esperantské

1300 vzt. 119 str. Cena 15 Kč.
Obstará La Progreso.

Pro kursy

B. kaj E. Migliorini:

Esperanta legolibro

144 p.

(Tra la vivo. Tra la lingvo. Tra la literaturo)

Prezo 7 Kč.



Sensaci v radiu

budí amer. 4lamp. co 7lamp. reflex. stanice na rám. anténu. — Krystal. stanice pro celé Čechy od Kč 80.—, dvoj. sluch. od Kč 90.— výše. Vyžádejte si ihned návody a ceníky zdarma od fmy Bohuslav Straka, radiozávod, Praha-Vršovice. Hálkova třída 63. Členům esper. klubů 10% ní slevy.



Chcete se rychle naučit esperantu?

Objednejte

BEDNÁŘOVU učebnici pro samouky a kursy

„ESPERANTO V 10 HODINÁCH A 500 SLOVECH“

obsahující úplnou mluvnici, cvičebnici, překlad cvičení, rozmluvy, četbu, korespondenci, slovníček a prop. část. (32 ilustraci, 126 stran jen K 12.—)

Zasílá Bednář-Esperanto-Brno-Dobrovského 16.

Esp. nálepky, 100 kusů, 13 různých druhů za 5 Kč. Obstará Vám Progreso.

ZNÁTE ?

Drama z maď. literatury:

MORGAŮ MATENE

de Fred. Karinthý. Trad. K. de Kalocsay.
138 str. 8 Kč.

Opatříme Vám následující knihy:

NIŽŠÍ CENY!

Fundamento eldono, 5 lingva	Kč	8.—
Fundamento, kun ĉeĥa trad.	„	3.—
Fundamenta Krestomatio	„	20.—
Fabeloj de Andersen	„	12.—
Georgo Dandin	„	6.—
Hamleto, Shakespeare, 170 str.	„	10.—
Ifigenio, Goethe, 108 str.	„	12.—
Proverbaro esperanta, 82 str.	„	10.—
Rabistoj, Schiller, 144 str.	„	12.—
Revizoro, Gogol, 100 str.	„	12.—
Rabeno de Baharah.	„	8.—
Marta	„	20.—
Eliro, Levidojpo	„	6.—
Sentencoj de Salomono	„	4.—
Predikanto	„	2.—
Lingvaj respondoj	„	10.—
Faraono, Bol. Prus, 3 sv. 600 str.	„	38.—
Pola Antologio, krátké povídky	„	6.—
Halka, opera, text	„	4.—
Interrompita kanto	„	3.—
Makbeto, Shakespeare	„	8.—
Mazepa, Slowacki, tr. Grabowski	„	6.—
Imenlago, novelo de Storm, 34 str.	„	3.—
Kaatje, el la flandra 111 str.	„	8.—
Fatala ŝuldo, teosofický román	„	10.—
318 str.	„	18.—
Reĝo Judea	„	2.—
Monadologio de Leibniz 31 str.	„	4.—
Vortfarado, de Ĉefeĉ	„	150
Vortaro de oficialaj radikoj	„	5.—
de Cart, 32 str.	„	12.—
Klasika libro de esp-o, 120 p.	„	30.—
Bulgara lando	„	70.—
Bulgara Antologio	„	6.—
Kataluna Antologio	„	5.—
Rakontoj de Arbes, 135 str.	„	8.—
Ķoboldo Ondra, Mahen	„	24.—
Ĉeĥa literaturo. Dr. Novák Arne	„	20.—
Vade-Mecum de Int. Farmacio,	„	5.—
Rousseau, 228 p.	„	7.—
La Esperantisto en Germanio	„	18.—
Moravia karsto	„	18.—
Tittl: Vortaro esp. ĉeĥa v.	„	38.—
Kühnl-Procházka: Slovník	„	15.—
ĉesko-esp.	„	12.—
Čánský-Riedl: Slovník esp.-	„	8.—
ĉeský	„	3.—
Kabe: Enciklopedia vortaro, 175, v.	„	9·60
Boirac: Plena vortaro esp. 3 sv.	„	15.—
Wüster: Maŝinfaka vortaro	„	8.—
Bednář: Učebnice esperanta	„	20.—
Kamaryt: Jazyk mezinárodní	„	30.—
Kotzin: Na obranu esperanta	„	
Šupichová: Učebnice esp.	„	
Kniha konverzace	„	
Žďárský: Učebnice esp.	„	
Bouška: Škola esperanta, úplná	„	

Obstaráme za předem zaslaný obnos. Žádejte složenku.

LA PROGRESO, Praha VII., Sochařská 333.